


IJK en Nederlando?

La Nederlanda Esperanto-Junularo, fama kiel kunorganizanto de KKPS, kandidatiĝas por gastigi la IJK-on 2019. La proponata kongresurbo estas Someren, proksime de Eindhoven kun sia malmultekosta flughaveno. Tie en la rando de bela nacia naturparko troviĝas unika gastejo, kiu ŝajnus konstruita ĝuste por gastigi IJK-on: multaj litoj, granda tendejo, grandegaj salonoj, speciala muzikkelo kun trinkejo, kaj bonegaj kuirejoj. Kaj tio kun kotizoj kompareblaj kun polaj IJK-oj, kaj malpli da vojaĝkostoj.



La granda IJK-teamo por vi preparos bonegan IJK-on kun nederlanda precizeco kaj esperantista etoso. La temo proponita de la teamo estas *Drogoj, alkoholo, kaj tabako, ĉu bonaj por la socio?*, aŭ simple mallonge **Sekso, drogoj & rok'n'rolo.**

Venu somere al Someren!



Pos-Amiko

Vintro 2017, Numero 23

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Polujo ĉesas funkcii
1. UEA kopias TEJO-strategion
2. Nova konstelacio malkovrita
2. Akra batalo inter IJK-gastigantoj
2. Novjaraj celoj
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de

NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Polujo ĉesas funkcii

Hodiaŭ, je la 26-a de decembro, granda silento regas en tuta Polujo. Je noktomezo ekzakte ĉiuj trajnoj, aŭtoj kaj korstimuliloj subite haltis, kaj restas senmove ĝis la fino de la tago. Neniu vendejo funkcias, neniu manĝejo malfermas pordojn, kaj eĉ Radio Maryja silentas. Nepreparitaj homoj, ĉefe eksterlandaj vizitantoj, restas senhelpaj kaj en kelkaj okazoj malsataj kaj soifaj. Internacia helpkaravano jam survojas tra Germanujo, sed eble alvenos tro malfrue por helpi ĉiujn viktimojn.

UEA kopias TEJO-strategion

Denove UEA kopias sukcesan iniciaton de TEJO. Post la surprizo transposteniĝo de Paweł Fischer-Kotowski de Ĝenerala Sekretario al TEJO-volontulo, nun la Ĝenerala Sekretario de UEA Martin Schäffer demisias por iĝi Ĝenerala Direktoro. UEA ankaŭ kopias de TEJO malfruiĝon de retprojekto: kiel antaŭe Pasporta Servo, nun la nova retpaĝo de UEA jarojn malfruas.

Estas do atendate, ke UEA kopios pliajn strategiajn paŝojn de TEJO. Jam ĝi komencis dungi pli multajn volontulojn en la Centra Oficejo. Verŝajne baldaŭ UEA komencos kaŝi sian membrokvanton de siaj propraj membroj. Ankaŭ altigo de la aĝlimo kaj sendependiĝo estas eblaj paŝoj en la estonteco. UEA ankaŭ povus same kiel TEJO malplilongigi la estrarperiodon, tiel kontentigante la komitatanojn, kiuj proponas demisiigon de la estraro.

Nova konstelacio malkovrita

Gazetara komuniko de la Komisiono pri Scienca kaj Faka Agado de TEJO informas, ke ĝia laborgrupo pri astronomio malkovris interesan kolekton de steloj dum esplorado per nova pli forta teleskopo. La konstelacio, provizore nomata 2017KMF, troviĝas inter la konataj konstelacioj skorpio kaj sagitario, kaj ne estas videbla per nura okulo. Astronomo H.R. Skopo, membro de la komisiono, klarigas:

“La novmalkovrita stelgrupo havas 50 stelojn. Ĝia aspekta iom similas al franca esperantisto.”

TEJO jam komencis verki eŭropan subvencipeton por plu pristudi la aferon per renkontiĝoj en ses partoprenantaj landoj.

Akra batalo inter IJK-kandidatoj

Je sabato la 30-a de decembro je 10:30 estas planata prezento de du kandidatoj por gastigi la Internacian Junularan Kongreson de TEJO en 2019. En la ruĝa angulo staros Léon Kamenický kun sia slovaka teamo de batalantoj. Kontraŭ ili en la blua angulo troviĝos Rogier Hurman kaj liaj nederlandaj kamaradoj. La programero progresos en maksimume kvin raŭndoj, aŭ ĝis unu el la konkursantoj falos senkonscie. Kiel juĝisto funkcios Feliĉa, la estrarano de TEJO respondeca pri kongresoj. Piedbatoj kaj batoj sub la zono estos malpermesitaj. Biletoj por la spektaklo vendiĝos en akceptejo kaj trinkejo.

Pos-Amiko enketis Esperantistojn pri novjaraj celoj. Jen kelkaj respondoj:

- Travivi Esperanto-renkontiĝon sen malsaniĝi.
- Aliĝi al iu renkontiĝo dum la unua aliĝperiodo.
- Pli bone uzi la akuzativo.
- Aĉeti libron en Esperanto, kiu ne estas instruilo.
- Aboni la Pos-Amikon.
- Sukcese falsi stelojn kaj iĝi riĉega.
- Trovi amanton, kiu ne estas tuta kripo.
- Trovi iun ajn amanton.
- Finfine diri al miaj gepatroj, ke mi parolas Esperanton.

NEJ-Novaĵoj!

Gratulon al ĉiuj, kiuj travivis la sesan KKPS-on!

Neniu aŭtuno povas esti kompleta sen ĉeesti la Klaĉ-Kunvenon Post-Someran. Dum tagoj kun unu aldona horo 80 homoj travivis tiun faman renkontiĝon kune en kompakta grupdomo.



Kajton fotis Yves Nevelsteen

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Atentu pri subite falantaj amboj dum ĉasado de vojkuruloj!

Taŭro: Vi laŭte kverelos kun surdulo.

Ĝemeloj: Vi aprezos vian horoskopon.

Kankro: Vi malkovras, ke pli facilas danci bambon ol sambon.

Leono: Vi ricevos la programon de JES unu tagon post la fino de la renkontiĝo

Virgulino: Post poema ateliero vi ne plu estos.

Pesilo: Vi plonĝos kun Pos-Amiko kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Via patrino aliĝos al la IJK.

Kévin M.: Vi erare pensas, ke artikolo en tiu ĉi Pos-Amiko temas pri vi.

Sagitario: Post kurso pri pakado vi iĝos tiom bona, ke viaj pakaĵoj okupu negativan spacon.

Kaprikorno: Vi kreos tempomaŝinon, ĉar vi ankoraŭ ne pretas por 2018.

Akvisto: Januaro estos bona monato por elpensi novjarajn celojn por 2019.

Fiŝoj: Ĉiam finu viajn frazojn, por ke aliaj ne

En la programo estis balfolkaj dancoj, halovena balo kaj Kajto-koncerto dum Zamenhoffesto de Esperanto Nederland.

En la trinkejo furoris la buntaj kostumoj de la partoprenantoj kaj la noktomeza panrostado. La renkontiĝo fermiĝis per agrabla promonado tra arbaro ĝis la mezopunkto de Nederlando.

Nova estraro de NEJ:

Rogier Huurman	– prezidanto
Spencer van der Meulen	– sekretario
Agata Cichocka	– kasisto
Robin van der Vliet	– komitatano A
Arnold Averink	– retpaĝo
Jeremie Bert-Manoppings	– VS & TEJO

Ludotago en Den Bosch denove!

Sukcesa ludotago en Den Bosch je la 24-a de novembro. Dekkelkaj ludantoj, inter kiuj multaj novuloj, spertis agrablan tagon kun ludoj kaj picoj.